



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 118 (Tenth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Aprilo 1930.

ART AND ESPERANTO.

"A fitting medium, maybe, for science and commerce, but not for art, and beauty, and the things of the spirit." How often is this asserted by people who have not heard a word of Esperanto. This type is, however, shrinking in number as a result of radio broadcasting, which has brought to the homes of millions the ear-caressing euphony of our language. It is well to remind those concerned that only speakers with correct and pleasing Esperanto enunciation should be chosen for this form of propaganda.

Rather piqued by the frequent mention of Esperanto in radio programs, a certain "malsamideano" was heard to say, "We have a better world language than Esperanto—and that is Art. When the world hears by radio a sonata by Beethoven it needs no other auxiliary language."

True it is that music is a powerful factor in bearing upon the human spirit a consciousness of its oneness, but a few words of explanation as to the author or artist are helpful, a desideratum that calls for a spoken I.L. for world-broadcasting.

Were it not for the regrettable fact that comparatively few people can undertake foreign travel, architecture, sculpture and painting also could be for the peoples a common treasury of international culture, because the language of these is immediately understood by the eyes. Up to now the cinematograph has not helped much in this relation, but we may hope that plement to radio-audition, will bring the world before even the poor man's eyes.

All the arts are inter-related. In order to form a universal culture more is needed than the exercise of eye and ear. Thought and feeling find outlet

to expression in Literature, a form of art which, because of language diversity, might be likened to a thing of beauty in fragments among the peoples of the earth.

Here then is one of the highest uses of Esperanto—to make it possible for every people to bring its contribution to humanity's Treasury of Art-endeavor, not only in the form of translations from their masters but also by original literature on the unfolding of art and history in their respective countries.

With what relief the student of men and manners greets the light that Esperanto brings to bear on the folk life of this or that small nation, on its costumes and customs, its care for historic edifices and other witnesses to man's desire to clothe with permanence his concepts of the lovely. We follow with sympathetic interest such solicitude, for it is good to feel that we, too, share in the common possession of that beauty wherewith highsouled men have garlanded the world. We are brought to confess that no nation has a monopoly of a given form of art, that it is, indeed, difficult to rank any one people as the possessor of treasures that mark it as most appreciative of the beautiful.

Who would to-day seriously affirm that Esperanto is no medium for the expression of feeling? Had this been true it long ago would have fallen to sleep in the tomb-yard of dead systems. Instead of which, the language is athrill with all the vigor of life.

It has been Dr. Privat's task of the last two winters to explore the interplay of human emotions and the capacity of Esperanto for expressing it. The result of his enquiry will soon appear in print. What are his conclusions? That the feelings or emo-

tions of man are in a state of constant flux and flow. In their eternal refusal to remain unexpressed they are, as it were, ever leaping against and breaking down the vain restraints of language. New words are constantly needed to clothe the eternal procession of thought pictures set up in the mind by man's ever-restless faculty to conceive ideas that defy the meagre limits of the available terminology.

This line of language evolution is clearly seen in Esperanto, in which the fantasies of highly imaginative writers are finding successful and striking expression. In this way is being created a rich treasury of word forms derived from a comparatively slender stock of root words by the process of blending the various roots into compounds. This practice of word combination, unfettered by usage or idiom, makes of Esperanto a language for all purposes infinite in its possibilities of expression, a uniquely fitting mirror of the mind wherewith to reflect, as far as is humanly possible, the subtlest motions of the spirit.

We need have no fear that Esperanto will break down in some exigency of the future. Its ability to assimilate what it needs from the word-wealth of the world, its readiness to appropriate the best forms of expression that the collective mind of a dominant civilisation has hammered out, ensure to its onward march an undisputed road. (Expansion of essay by Dr. Privat in January "Esperanto."—Robo.)

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned

That at Preschen, a village in Bohemia, candidates for office of policeman must speak Esperanto.

That at Brussels 400 grammar-books of Esperanto have been distributed to the police.

That the Belgian Institute of Esperanto has just published Belgian literary anthologies in Esperanto, one originally written in French, the other in Flemish. They comprise over 600 pages.

That the "New York Times" has interviewed M. Ernest Archdeacon, president of the French Society for the Propagation of Esperanto, on the progress of Esperanto in Europe.

That M. Andre Baudet, fervent Esperantist, has been re-elected President of the Paris Chamber of Commerce.

That a complete bibliography of International Language (560 pages) has been published by the U.E.A. It

claims to be a uniquely detailed treatment of the history and evolution of the idea that culminated in Esperanto.

That the Social Democratic Party in Finland has placed itself behind the Esperanto movement.

That the Swedish Telegraph Service and the Stockholm Tramway Board have opened official Esperanto courses, with the aim of aiding foreign visitors to the coming Stockholm Exposition.

That the BEA sold 101 "Originala Verkaro de d-ro Zamenhof" at 15/-, in 3 months.

That in 1930 more than 1500 Esperanto broadcasts were made in Europe from 68 stations in 15 countries.

That 1000 "All Quiet on the Western Front" in Esperanto were sold in 2 months.

That Oxford University has followed Cambridge, in forming an Esperanto Society. It has received official recognition from the Univ. authorities.

KURSO PER TRADUKADO.

We much regret that owing to our not receiving copy from New Zealand, Mr. Gordon's translation course must be omitted from this issue.

GRATULON.

al s-ro Stanley Bishop, kiu sukcese kaj honore eltenis ĉe la diploma ekzameno BEA. Brave!

El "Originala Verkaro."

El letero al Vladimir Majnov. 3.viii. 1889. Estimata amiko! El Aŭstralio, kiom mi memoras, mi ricevis leterojn internaciajn el Melbourne kaj el unu urbeto proksime de Sydney; sed de tiuj sinjoroj mi ne ricevis nek formalan promeson nek adresojn, kvankam iliaj leteroj estis skribitaj tre varme.....—L. ZAMENHOF.

OUR ADDRESS

Is "La Suda Krucio," 731F, P.O., Elizabeth-str., Melbourne.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas abonojn kaj akceptas kun vera korsalto la sindonajn donacojn al nia kaso parte de jenaj fideluloj:—F-ino E. Carrick, 4/6, marto, '31; kaj 3/- donaco; H. Byatt, 40/- (garantiaĵo); Hobart grupo, 30/-; D. Guilbert, 20/- donaco; s-ino Lloyd, 4/6, junio, '31 kaj donaco 1/6; E. Pryke, 4/6, marto, '31; prof-o R. Woodhouse, 4/6, marto, '31; H. Davies, 4/6, marto, '31; f-ino C. Bridge, 4/6, marto, '31; f-ino J. Orr, 4/6, marto, '31; R. Pike, 4/6, marto, '31; f-ino A. Bennett, 4/6, okt., '30; R. Clarey, 4/6, aprilo, '31 kaj 10/-

donaco; s-ino Butler, 5/-, aprilo, '32; f-ino H. Conwell, 4/6, majo, '31 kaj 2/6 donaco; s-ino Purnell donaco 10/-; A. More, 5/-, julio, '31; Christchurch Club, 5/-, julio, '31; f-ino Trice, 4/6, marto, '31.

SKRIBU TUJ!

al la oficejo, por ke vi ricevu
SEN PAGE

kaj afrankite la specimenojn de la
ESPERANTA GAZETO

"O O M O T O"

antaŭ ol vi ĝin abonos.

Oomoto Propaganda Oficejo

Kameoka, Kioto-fu, (Japanujo)

THE GUARANTEE FUND.

Gratefully the Redakcio acknowledges receipt of promises from the following wellwishers of our gazette: Mr. H. Byatt, £5; Mr. F. Simon, £2; Miss L. Saw, 5/6; Mrs. Trundle, 10/-; Miss Conwell, 2/6; Mr. N. Perkins, £1.

FULL FILES OF "LA SUDA KRUCO."

We have learned that Mrs. Purnell, and Miss Hopton, Esperantists of long standing, and faithful friends of S.K., have complete files of our little gazette. We congratulate these ladies on their care in conserving this publication intact, and commend the interest in our work that prompted it.

LARGE-HEARTED MOVE BY SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

The above society has forwarded to us the sum of £2/13/-, proceeds of a dance held on the eve of 27 March, as an expression of its good will to La Suda Kruco in its fight for an assured position on the list of firmly established Esperanto gazettes. Thanks are specially forwarded to Miss J. Orr and Messrs F. Simon, Rutland and Torr, for their generous attitude and active interest in this matter. We wish bon voyage to our "sambatalanto," Mr. Rutland, who has left for Oxford, where he will attend the Universal Congress.

KRONIKO.

Sidnejo, Nov-sud-kimrujo. — La 9an de aprilo, per vaporŝipo Orontes, forvojaĝos nia estimata samideano, s-ro V. Rutland, por reprezenti la Sidnejan E. Societon ĉe la kongreso en Oksfordo. Je la ĉiumonata danco de la klubo la 27an de marto la anoj lin adiaŭis, kaj donacis oran horloĝeton por manradiko. Ĉeestos la kongreson ankaŭ tri aliaj sam-oj—gesroj. Hart kaj s-ro Barnett.

En marto, laŭ aranĝita sesmonata programo de la SES, parolis jenaj sam-oj: s-ro E. Pryke, pri Muzikinstrumentoj; f-ino H. Anderson pri Du Libro; kaj s-ro I. Serišev pri La Stato de Moderna Japanino. Aparte interesa estis la lasta temo, pro tio ke s-ro Serišev antaŭ ne longe vivis trijaron en Japanujo kaj el sperto do povis paroli.

Marte la klubo enregistris feliĉente plurajn membrojn novajn; en unu vespero klubaniĝis kvar ges-roj. Unu ĵus aliĝinta, profesoro R. Woodhouse, portas valoran forton al nia klubo, ĉar krom fakto, ke li antaŭlonge studis E-ton en Dublino kaj Londono, li posedas belan kantvoĉon, per kiu li ĉarmis nin, kantante ĉe la lastaj du festvesperoj.

La 17an de aprilo ekzameno por la BEA diplomo havos lokon. Iuj verdsetuloj vizitante Sidnejon por paska ferio, certigu, ke ni bonvenigus ilin elkore. Espereble ili partoprenos en la ekzameno.

Perth, Okcidenta Aŭst.—Spite de tre varmaga vetero ĉe ni, la fidelaj anoj ĉiam ĉeestas la kunvenojn por ekzercaĵi sin je nia lingvo. Nin vizitis f-ino Hibberd, kiu ĵus alvenis de Anglujo, ŝi estas ano de Croydon-apud Londono Societo, kaj intencas resti en O.A. En la nomo de nia societo s-ro Saar bonvenigis la vizitanton. F-ino Hibberd taŭge respondis per mallonga parolado, per kiu ŝi transdonis saluton al nia grupo de la Croydon anoj.

Melbourne, Vic.—S-ro P. Hudson reedonis plezuron al Societanoj per plua rakonto de vojaĝimpresoj en Hindujo. Li komencis priskribon de Amritsar en la nordo, urbo kies konstruaĵoj estas sole el brikoj. Vidindaj ĉi tie estas granda tapiŝfabrikejo en kiu laboras 800 homoj; kaj la "Ora Templo," kiu staras sur insulo meze de akvujo. Li revenis de Amritsar ĝis Lahore kaj de tie al Rahal Pindi. De tiu urbo li veturis aŭtomobile laŭlonge de tre serpenta vojo al Murree, kiu troviĝas sur monto je alto de 6700 futoj. Bela panoramo estas videbla de tiu loko, kiun li lasis por sekvi la riveron Jehlam ĝis Baranulla, kiu sin trovas apud rivero. Je distanco de cent mejloj, belaj altkreskaj poploj kreskas ĉe la bordoj de la rivero. Li poste vizitis Srinagar, kiu estas la ĉefurbo en la bela distrikto Kashmir. Estas reĝa palaco tie, kaj en la ĉirkaŭaĵo oni povas vidi la belan spektaklon de lago kun amaso de diverskoloraj lotusoj facile naĝantaj sur la supraĵo. Sur la kanaloj troviĝas multe da boatoj, sur kiuj oni konstruas ĉambrojn. Ĉi tiuj meblitaj kvazaŭdomoj estas lueblaj je malalta luprezokaj multaj familioj loĝadas en ili. S-ro

Hudson finis la interesan rakonton per montro al delikata skatolo el alabaŝtro tre lerte ĉizita.

Gratulojn al jenaj gesamideanoj, kiuj sukcesis en la ekzamenoj ĉe la Melb. Esp. Soc. antaŭ Kristnasko.—S-ro Bishop gajnis la diplomon kun honoro. F-inoj Mitchellson, H. Bostock, kaj Kensley, Mervyn Bishop kaj s-ro P. Holmes (kun honoro) sukcesis en la Unua Ekzameno. Gratulojn ankaŭ al la instruantoj pro la 100% sukceso.

QUERY CORNER.

Under this head are invited questions on Esperanto history, language and literature.

S-ino L.P. in M.—Good! Keep on with reproduction of "Suda" pars.

S-ro B. in B.—Your use of "pagenda" is correct. The suffix -end (used by some writers, but not yet approved by the Language Committee) has the meaning of "kio nepre devas esti —ata (ita)." "Kartago estas detruenda!" (It is imperative that Carthage be destroyed!)

Bek. in To.—The principle of one word one meaning is not and never was a feature of Esperanto, although some writers have claimed the contrary.

P. "Strofo," a verse of the Bible, a hymn, a poem, etc., but "verso" means a line of poetry.

Nov. in C.—The first edition of the New Testament was the translation of one man, Rev. C. Rust, revised, as to the Esperanto only, by Alfred Wackrill. The present edition, the labor of several scholars, would seem to be more faithful to the original Greek and more trustworthy in every respect.

U.E.A. MEMBERSHIP.

Germany leads with 1403 members, Ĉeĥoslovakia second with 1361, then comes Britain, 745, France 633, and Holland 449. Australia has 132.

BOOKS PRIZED BY THE AKADEMIO (1914-30).

"Estu homo," by Charles Wagner, translated by S. Meyer; "Rikke Tak Tak," by H. Conscience, trans. Pose-naer; Luyken's "Mirinda Amo" (original); Balzac's "La Vendetta," trans. Merckens; "Rolandkanto," trans. Dr. Noel; "Herman and Dorothy" (Goethe), trans. Kuster; "Idoj de Orfeo," (original), by Bulthuis; Baghy's "Preter la Vivo"; Petolfi's "Johano la Brava" (trans. Kalocsay); "Kataluna Antologio"; Baghy's "Dancu Marione-toj!"; Haggard's "Luno de Izrael" (trans. Butler and Payson).

PRI VIA VORTKONO.

Bedaŭrinde estas al ni neeble speciale klarigi ĉiujn vortojn, kiujn la unu aŭ alia leganto ne komprenas, precipe se ni ne scias, en kiu artikolo ili aperis. Leganto de aktuala Esperanto-gazeto aŭ -libro devas posedi sufiĉe ampleksan vortaron novtempan. Krom tio li devas mem iom pripensi pri la signifo. Ofte iu ŝajne nekonata vorto estas nura kunmetaĵo (ekz. rest-ero, dom-alta, fig-aro, anal-isto) aŭ ĝi estas preseraro (otero anst. etero, saŭkta anst. sankta k.a.); kelkfoje la kunteksto klarigas la sencon. Sed ekzistas vortoj aŭ esprimoj (sciencaj, teknikaj kaj similaj), kiujn eĉ la redakcio ofte ne komprenas. Ni devas ĉe tio fidi la fakkonon de niaj sciencaj, teknikaj aŭ similaj kunlaborantoj. Cetero, kiel ni jam foje rimarkis, ĉu oni ĉion komprenas, kio estas presita en la nacia lingvo? Eĉ tute perfekta esperantisto renkontas esprimojn, kiuj restas al li nekompreneblaj. Pro tio neniu (nek komencanto nek progresinto) rezignos entute la legadon de gazeto aŭ libro.—El "Heroldo de E."

LA SKRIBMAŜINO DE MIA PATRO.

Ĝi staris sur kverka tableto apud fenestro en nia mangoĉambro. Vespere ĝi estis alŝovata al la lumo de l' supertabla lampo. Tage ĝi laboradis nur dum kelkaj horoj, sed ĝia vera vivo komenciĝadis vespere. La frapbruado de ĝiaj etaj klavoj estis por mi kvazaŭ lulkanto; io mankis al mi kaj la dormo forkuris dum maloftaj vesperoj, kiam ĝi staris silenta.

Ĝi estis mia bona, honesta amiko. Mi alkitimiĝis al ĝia unutona melodio, en kiu la frapadon de l' klavoj interrompdis bela sonoro, anoncanta finiĝon de la linio, kaj grincio de la tirilo; ĝian lignan kovrilon miaj pupoj ĉiam opiniis tre oportuna veturilo.

Mi preskaŭ ne memoras la tempon, en kiu ĝi ekokupis la lokon en nia domo. Fluis jaroj—ĝi ĉiam laboradis senlace, estante ne nur maŝino, sed preskaŭ amiko de mia patro. Amiko neniam senpacienciganta, neniam malesperanta, sed ĉiam fidela, ĉiam esperiga.

Komence mi estimis ĝin, kiel aĝan, seriozan amikon de la familio. Poste mia rilato fariĝis pli intima. Mi stariĝadis apude kaj kun intereso rigardis la laboradon de ĝia meĥanismo. Fine mi kuraĝis sidiĝi sur tabureto kaj ekfrapi la klavojn, ĝojante, ke la literoj estis multe pli belaj ol tiuj, kiujn skribis en kajero mia mallerta mano. Sed mia unua vera

ĝojo estis, kiam mi maŝinskribis ekzercon kaj fiere montris ĝin al mia instruistino. Mi estas certa, ke nur tial ŝi ne tre admonis min pro eraroj, kiuj en alia okazo kaŭzus ŝian severan mallaŭdon.

Mi kreskis, pasadis de pupoj al fabeloj, de fabeloj al ĉiam pli realaj rakontoj, ĝi — la maŝino — senĉese laborante, rakontadis per sia unutona voĉo ĉiam la saman historion.

Dum unu vintra vespero, kiam post pacienca, sepjara laborado mia patro finis ian gravan verkon, en nia loĝejo bruis gajaj ridoj, gratuloj, babiloj. La maŝino staris trankvile, silente en sia anguleto. Kaj en mian infanan cerbon venis la penso, ke se mi estus la maŝino, mi sentus min ofendita pro tiu forgeso dum tiu solena vespero, kiun mi ja helpis alproksimigi. Sed la sen viva maŝino estis pli alta ol homaj koleroj kaj ĵaluzoj, kaj jam la sekvintan tagon ĝi kantis per sia kutima melodio novan kanton de laboro.

Tiel ĝi senlace laboradis dum multaj jaroj—sed pasis la feliĉa tempo. Ĉiam pli ofte ĝi staris silenta ripozanta kontraŭ sia volo kaj kontraŭ la volo de l' homo, kies koron dolorigis la okazintaĵoj de l' ekstera mondo.

Venis la momento, ke rigidigis la fingroj, kiuj movigadis ĝiajn etajn klavojn... Ĝi staris en sia anguleto, kovrita per nigra kovrilo. Ĝi staris trankvila, indifera, nenion sentanta—la maŝino.

Monatoj pasadis. Sur la kverka tableto la maŝino staris—fermita. Longe mi hezitis, antaŭ ol mi kuraĝis levi denove la kovrilon. Kaj ŝajnis al mi tiam, ke mi levas kovrilon de ĉerko...

Mi ekfrapis — resonis la klavoj. Malrapide, malkuraĝe, kvazaŭ kun miro, kiel homo, kiu vekigas post longa dormo kaj demandas, kie li estas, kiuj estas tiuj, kiuj lin ĉirkaŭas. Kaj ĝiaj sen vortaj sonoj ŝajnis vortoj de kunsento, eble la plej kortuŝaj...

Dek jaroj pasis. La malnova maŝino staras sur sia tableto. Kompare kun la lastaj sistemoj ĝi ne prezentas grandan valoron. Mankas kelkaj gravaj arangoj kaj stenotipistoj rigardas ĝin komplete, preskaŭ malestime. Mi tamen respektas ĝin. Kaj kiam mi deprenas la kovrilon, kvazaŭ ridetas la amika vizaĝo kaj antaŭ, la okuloj hele brilas la surskribo, ĉizita sur la maŝino: "Ni laboru kaj esperu."

LA TAKTO

Kio estas takto? Ĉar la granda Esperanta Vortaro ne jam aperis, ni

malfermu la Vortaron de Kabe. Ni trovas la jenan difinon:

Takto.—Arto konvene agi kaj paroli kun aliaj personoj, konforme al la circumstancoj.

Mankas ekzemplo. Sed ni opinias, ke la jena povas servi:

Plumbisto eniris en banĉambron, en kiu sinjorino, forgesinte ŝlosi la pordon, sin banis. La plumbisto trankvile eliris, dirante: "Pardonu, sinjoro, mi ne sciis, ke vi estas tie ĉi."

NOBLA KAJ MALAVARA AGO DE ZAMENHOF.

Estis en septembro 1909, en Valencio, post la Universala Kongreso de Barcelono. En la Palace Hotel, kie loĝis D-ro Zamenhof, ia familio sin prezentis al li kun la peto, ke li operaciu je la okuloj malsanulon, jam kuracitan sen sukceso de aliaj kuracistoj. La familio petis, petegis la Majstron, ke li esploru la malsanulon. D-ro Zamenhof devis pro tia granda insistado kaj en bonfara celo plenumi tian peton, sed li trovis sin en la embarasa situacio, ke li estas fremda kuracisto ne havanta operacian ĉambron, nek la necesajn ilojn. Feliĉe samideano okulisto, D-ro Aguilar Blanch, proponis sian ĉambron kaj ilojn al D-ro Zamenhof, kiu faris tre sukcese la petitan operacion.

La familio plej kore dankis kaj demandis pri la honorarioj. D-ro Zamenhof rifuzis ion akcepti. La familio kyazaŭ ofendiĝis pri tio, ke li ne volas akcepti la rekompencon por la altrudita operacio, kaj la insistado de la familio estis tiel prema, ke D-ro Zamenhof devis akcepti sian honoraron. Li tuj donacis ĝin por la kaso de la Valencia Esperantista Grupo.

—El "La Movado."

LA ĈEKOJ DE RUDYARD KIPLING.

Oni scias, ke la aŭtografoj de Rudyard Kipling havas grandvaloron komercan. Tial Kipling volonte subskribas ĉekojn, kiam li devas pagi malgrandajn sumojn, kaj li kontente konstatas, ke multaj posedantoj de liaj ĉekoj ne iras por postuli la pagon de la sumoj, kiuj estas ŝuldataj al ili.

LA TEMPO MATURIGAS.

Unu el la iomete konataj lingvaj projektoj, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj, nome "occidental," jam forte malantaŭenmarŝas. La red. de la sola occidentala gazeto en la lasta n-ro sciigas al sia legantaro, ke la gazeto, dum 1929 aperinta monate, en tiu ĉi jaro aperos nur en ĉiu dua monato.—Kiom longe ankoraŭ?

DETRUO DE MARBIRDOJ PER OLEA FORJETAJO.

Kun la alveno de oleobrulaĵoj ŝipoj venis ankaŭ terura minaco por la birda vivo de la maroj. La ŝipoj malsargas en la maron sian uzitan oleon, dikan gudrecan substancon. Ĝi rifuzas subiri, kaj kolektiĝas sur la supraĵo de la akvo en grandaj masoj, kiuj flotas tien-reen, portante morton al fiŝa kaj birda vivo. Kiam la birdoj kontaktiĝis kun tiu substanco ili ne plu havas ŝancon de vivo. Ĝi algluiĝas al ilia plumaro, tiel ke ili povas nek naĝi, nek flugi, nek havigi al si nutraĵon, kaj ili disbatiĝas de la ondoj ĝis la morto finas ilian turmenton.

En 1926 la marpotencoj okazigis Konferencon en Washington pri la temo, Olea malpurigo de la maro, kaj oni redaktis konvencion kiu pledis por lego malpermesanta eligon de eluzita oleo en regiono malpli ol 50 mejlojn malproksima de iu ajn marbordo. Tiu konvencio tamen ne estis subskribita.

La Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj opinias, ke la plej kontentiga solvo estas instalado de oleo-apartigilo sur ĉiu oleobrulaĵa ŝipo, kaj multaj britaj ŝipkompanioj jam faris tiun paŝon. Tiuj maŝinoj apartigas la oleon de la bilĝo, pretigante la oleon por refoja uzo, tiel ke nur la nemalutila bilĝo pumpiĝas en la maron. La bezono por instalado de oleo-apartigiloj fariĝas ĉiutage pli urĝa. Kun celo direkti publikan opinion al tiu demando, la Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj preparis glumarkojn kun la vortoj: "Insiste petu, ke la ŝipposedantoj instalu olean apartigilon, por savi la marbirdojn" en lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana, kaj Esperanta. La Societo volonte sendos al iu provizon, se tiu sciigos al 82 Victoria-st., London, S.W.1., la kvanton utiligeblan.

MODELA TEKSTO.

El Fund. Krestomatio, kvina eldono, p. 268.

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas

ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinda obstina malkonfido, sed eĉ kun ia malklarigebla malamikeco. La pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi: oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj plej senutila sensencaĵo, se ĉi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de instruituloj aŭ utilaj publikaj agantoj. La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj... la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili spritajn artikolojn.... kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridegas kaj ne faras al si eĉ por unu minuto la demandon, ĉu ekzistas eĉ ĝuto da senco kaj logiko en tiuj spritaj artikoloj".—ZAMENHOFF.

RECENZO.

Kengott's Esperanto Course.

The author, Mr. Kengott, of Texas University, asserts that this 180 pp. book is a practical Esp-o course for beginners, based on sound pedagogical principles and written by a teacher of academic standing, actually engaged in the teaching of modern languages. Although not "complete"—no beginners' course is complete—it truthfully claims to furnish the student with the essentials for a sound working knowledge of Esp-o. Much opportunity is provided for mental gymnastics in an effort to prevent mere parrot-like rendition of what has possibly been absorbed but not digested. The principle of reviewing the material of previous lessons in the form of questions asked by the teacher is not an original feature, but obviously a sound one. The index and vocabulary given are helpful.

After reading that Dr. E. Privat and P. Stojan, L.K. painstakingly and cautiously examined the proof-sheets, one feels diffidence in venturing any adverse criticism. Indeed, there is little

SUBTENU LA SAMIDEANAJN METHSTOJN !

PERCY HOLMES
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

to query in this latest production of our tireless Texan pedagogue, and nothing to seriously challenge.

Mr. Kengott informs the learner that E is pronounced as in "angelic," U as in "ruse," and H as in "loch," or Spanish "jota." True, the book is designed primarily for Americans, but we would remark that Englishmen pronounce "loch" as "lock," and few indeed have any idea of the sound of "jota." 20. Ili loĝas en la sama strato, tiel, ke (tial), P. ofte povas viziti ilin. 33. Blovas milda venteto, tiel, ke (tial), oni ne suferas pro tro ega varmo. 30. Komunikas ekzaktan ideon (donas precizan ideon); 31. facile, eas(il)y (why parentheses?); homo, "a human being" rather than "man"; 61. signoj (simp-tomoj); 80. La besteto opiniis, ke la leono volis (as) (is wishful, or, had wished?) ĝin mortigi. It seems a pity that Mr. K. runs counter to the Lingva Komitato in that he uses "Meksiko" instead of "Meksikio" or "Meksiklando" for the country. Does he pronounce "depost" with stress on the penultimate? If not, should he not use "de post"? That it is not advisable for any but experts to form further words in "um" is good advice. 122. "Pundo" for the English pound sterling is rare. We are more accustomed to "monfunto" or "funto sterlinga." "Enuiga" means "tedious, boring," cp. teda. The author renders both words "tiresome." "Aktuale" does not mean "actually." 125. havigu (al vi); 127. (poŝt) markojn.

It is interesting to learn that Spanish is perhaps the most logical national language, that in Esperanto all adjectives, with the sole exception of derivatives of "Esperanto," are written with a small initial. Does Mr. K. overlook Zamenhof's Biblical usage of capitals for adjectives formed from place—and personal names? Would our author not counsel capitals in writing derivatives of little-known place names (ex. Paria marmoro—Parian marble)? 140 brill(i)ant; 145, "his Lordship" would be translated "lia lorda moŝto," if reference is to a British peer.

An honest piece of work, the sole

barrier to the wide use of which in Britain may be found in its price—one dollar—(ROBO).

INTERLERNEJA KORESPONDO

Grava alvoko al instruistoj kaj gejunuloj.

Laŭ iniciato de "Cooperation Intellectuelle," fondiĝis en Parizo "Comite Permanent de la Correspondence Scolaire Internationale." Alĝis Germanujo, Anglujo, Ameriko, Franclando, Italujo, Rumanujo kaj Svislando. La korespondado okazis ĝis nun en la naciaj lingvoj.

En decembro 1929 oni starigis komitaton en Nederlando por kunlabori. La celo estas individua korespondado inter lernantoj ĝis 21-jaraj. Tiu ĉi komitato konsentis ankaŭ en Esperanto peradi korespondaĵojn.

Nun ni povos montri al tiu ne-Esperanta komitato, ke per Esp-o la korespondado plej multe efikas, ke en tuta mondo jam estas infanoj kaj gejunuloj, kiuj kapablas rekte interrilati.

Instruistoj kaj gejunuloj, mi petas vian helpon! Sendu leteron al s-ino M. Nieuwenhuis, Jan van Goyenstraat 44, Leiden, Nederlando kaj aldonu: Nomon, sekson, lernejon, adreson, profesion de patro aŭ edukanto. Ankaŭ la temon pri kiu vi deziras korespondi.

De la partopreno dependos, ĉu oni daŭrigos aldoni Esperanton por la korespondo. Montru, ke ni ekzistas!

—Julia Isbrucker. Hago.

LA UNUA ESPERANTA FILMETO

La Unua Esperanto-Parolanta Filmo estas farita de "Paramount-Famous-Lasky - Corporation," Times Square, New York, U.S.A., kiu anoncas, ke en Usono ĝi havis plenan sukceson. Ĝi aperos en ĉiuj Eŭropaj landoj, en Aŭstralio, Japanujo, Brazilo ktp.

Estas grave, ke en ĉiuj landoj oni sciigu pri la datoj, kiam tiu ĉi filmo estos prezentata. Tion oni povas fari ĉe la loka Paramount-Oficejo aŭ kinematografejo.

Samideanoj, vizitu amase tiun unuan Esperanto-parolantan filmon kaj poste nepre skribu aprobeletron al la produktinto de la filmo esperante en New

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun olezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE,

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco iŝ kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

MELBOURNE.

York, laŭ supra adreso, ĉar en baldaŭa estonteco la Paramount-Filmkompanio intencas fari aliajn Esperanto-filmojn, kio ja dependas de la kvanto de la apobleteroj.

La filmo estas farita en formo de parolantaj aktualaĵoj (news reel).

ĈU LA MORTO FARAS FINON AL ĈIO ?

Stranga spertaĵo de pastro.

Pastro F. C. Spurr, Baptista predikisto, asertas, ke li sendis sian ok-jaron filon kaj ties patrinojn, por refortiĝi ĉe feriloko en Lincolnshire (Anglujo). Post tio li vizitis kinematografejon, kie li ĉe 4.45a horo sentis iun tuŝi sian manon, kaj jen mirigate li vidis la filon en plej proksima al li sidloko. Sentante sin timkonfuzita, li iris hejmon. Tiam ekkrakis fulmotondro, dum kiu li ricevis telefonan komunikon, ke lia filo ĵus droniĝis. Ĉe la enketo li sciigis, ke la knabo eniris la maron ĉe 4.20a horo p.t. kaj drone mortis ĉe 4.45a.

"Kiel honesta Anglo mi rakontas ĝin," aldonis s-ro Spurr. "Jam 25 fojojn mi havas nerefuteblan ateston, ke li vivas kaj bone fartas sur la alia bordo. Kompreneble, ni ne povas rajte prediki tian, kiel la religion. Sed se mi estus devigita kredi, ke en la Universo la homo, kun lia malsaĝo, volupto kaj pekeco estas la plej alta estaĵo kreebla, mi tre volonte mortus kun blasfemo sur la lipoj."

—El la Angla trad. (Robo).

TO NEW ZEALAND SUBSCRIBERS.

It would be much appreciated were our N.Z. friends kindly to bear in mind the fact that only money-orders are readily cashable in Australia. The sending of Postal Orders or paper money involves certain difficulty or financial loss to those acting for La Suda Krucio.

Al s-ro M. en S. Peterburg.—Via energia laborado estas tre laŭdinda: sed via faremeco estus multe pli utila por nia afero, se vi uzus ĝin en alia maniero. Anstataŭ la personoj, kiujn vi gajnis por nia afero kaj kiuj nenion faras, estus pli utile se vi povus gajni unu aŭ kelkajn riĉulojn, kiuj volus ion fari por nia afero. La plej bedaŭrinda fakto en nia afero estas tiu, ke ni ne havas ankoraŭ inter niaj amikoj eĉ unu riĉulon, kiu povus kaj volus ĝin subteni. En nia tempo sen rimedoj materialaj ĉia afero povas progresi

nur tre malrapide, kaj ĉiu paŝo kostas doloron kaj suferon. (Respondoj al la amikoj "La Esperantisto," 1890).

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne. 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behnken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.